

HAMBURG
Esperanto



4/

1997 Junio/Julio

**Bulteno de Hamburga Esperanto Societo r. a., Klaus-Groth-Str. 95, D-20535 Hamburg,
tel. + fakso: +49 40 250 30 65**

Redaktoro: Benno Klehr, Oelckersallee 31, D-22769 Hamburg, Tel. (040) 43 51 97

Redaktofino de n-ro 4/1997: 14-09-97

**DU UND
DEINE
WELT**

**Nova adreso por *Du und Deine Welt*, la granda ekspozicio en Hamburg 29.8.-
7.9.97**

La strato apud la ekspoziciaj haloj en Hamburg, kie ankaux la Hamburgaj Esperanto-grupoj partoprenas en la ekspozicioj *Weiterbildung* kaj *Du und Deine Welt*, ek de kelkaj semajnoj nomigxas laux la gxemelurbo: *St. Petersburger Straße*. Tuj flanke trovigxas la nomo de alia gxemelurbo en *Marseiller Straße*. (al stacio *Dammtor*). BK

Sentenco

Ekzistas du aferoj,
kiuj estas senfinaj:
La universo kaj la stulteco.
Rilate al la universo
mi ne estas tute certa.

laux Albert Einstein

Karaj legantoj,

baldaux denove okazos la granda ekspozicio "Du und Deine Welt" (29.8.-7.9.). HES partoprenos per stando en halo 4, stando 4034. Se vi havbas tempon, vizitu nin kaj eble iom helpu, prezenti nian aferon al la publiko aux helpu per mondonaco.

Dankon!

Benno Klehr

Enhavo

[Festo de Euxropanoj 1997](#)

[Impresoj el la Euxrop-Unia Esperanto-Kongreso](#)

[Australio](#)

[Programo](#)

[Solvo de nia terura enigmo](#)

[Esperanto kaj polico](#)

[Invito al Jubileo](#)

[Malmö invitas](#)

[Landa kunveno 1997](#)

[Stranga benzinejo: la solvo](#)

[Ni gratulas al Sabine Meyer kaj Christian Darbellay](#)

[Kolzo-Metil-Estero](#)

Festo de Euxropanoj 1997

Dum la semajnfino de 26a kaj 27a de Aprilo 1997 sur la urbodoma placo en Hamburg HES arangxis informstandon pri Esperanto. Multaj interesitoj el diversaj Euxropaj landoj kaj ecx el aliaj kontinentoj petis informojn.

La konscio pri la lingvaj problemoj en Euxropokaj speciale en Euxropa Unio sxajnas farigxi pli granda ol en antauxaj jaroj. Esperano-amikoj el Bosnio, Japanio, Koreio, Ruslando, Svislando kaj Togolando, Malsupra Saksio kaj Sxlesvig-Holstinio vizitis nian standon kaj subtenis nian laboron.

[Enhavo](#)

Impresoj el la Euxrop-Unia Esperanto-Kongreso

La kongreso okazis de la 16-a gxis la 19a de Majo 1997 en Stuttgart. Partoprenis pli ol 400 personoj, inter ili pli ol 170 Germanoj.

Al Hamburgo vinis 8. La partoprenintoj ne nur venis el landoj kiuj apartenas al la Euxrop-Unio, sed ankaux el aliaj Euxropaj landoj kaj ecx el Hindio kaj Ganao. La programo de la

kongreso konsistis el diversaj prelegoj kaj fakaj kunsidoj de diversaj grupoj.
La jarĉefkunveno de GEA okazis dimanĉon. *D-ro Linkohr*, Euxropa parlamentano, kaj *s-ro Cwik*, membro de la Euxropa Komisiono akceptis la inviton de la kongresa komitato.
Mi cxi-tie nur volas menci kelkajn prelegojn: *D-ro Linkohr* prelegis pri la pligrandigo de la Euxrop-Unio al oriento. La prelego estis German-lingva kaj tradukita en Esperanton. La diskuto kiu sekvis la prelegon estis en Eperanto kaj tradukita simultane.
S-ro Cwik respondis al demandoj pri la valut-unio.
Okazis ankaux interesa kaj vigla diskuto sub la titolo "Euxrope - kien vi?". Dum cxi-tiu diskuto oni ankaux parolis pri la lingvaj problemoj en Euxropo, sed sen rezulto. La prelegantoj estis impresitaj pro la viglaj kaj kompetentaj diskutoj.
D-ro Bormann prelegis pri al Akademio kaj respondis al lingvaj demandoj.
La prelegoj estis vere interesaj. Tuj post la prelegoj kaj diskutoj, ili estis haveblaj sur auxdo-kasedoj.
Ankaux libro-servo estis je dispono dum la kongreso.
La distra programo konsistis dum la lagoj el diversaj gviditaj ekskursoj. Multaj kongresanoj profitis de la varmega kaj bela vetero por partopreni en la ofertitaj ekskursoj. Mi konstatis ke kelkaj kongresanoj nur partoprenis en ekskursoj kaj fakaj kunsidoj.
Vendredon vespere okazis la interkona vespero. *Thomas Bormann* gvidis tra la vespero. Oni ludis muzikon kaj skecxojn por ni.
Dimanĉon la teatra grupo "Kia Koincido" ludis "La Kalvan Kantistinon". Tio tre placxis al mi kaj ankaux al la aliaj.
La kongreso estis tre bone organizita.
Dum la kongreso aperis artikoloj es diversaj gazetoj kaj radio-elsendoj pri Esperanto.
Pia Haasis

[Enhavo](#)

Programo de HES

Klubejo malfermita Jxauxde ekde 18:30. Mangxo: 19:00 - 19:30. Programo: 20:00.
GIS: kunvenoj lauxbezone; informoj: Tel. (040) 58 71 82 aux 738 45 08.

1997-08-07

Revenintoj

raportas pri la Universal Kongreso de Esperanto 1997 en Adelaido/Auxstralio

1997-08-14

Pia Haasis:

Kubaj fabeloj

(Ne kubismaj sed Kubanaj) red.

1997-08-21

Werner Bormann:

Turnopunktoj en la historio de Esperanto en Germanio

1997-08-28

Sylwia Pömann:

La Internacia Junulara Kongreso en Essisi/Italio

1997-09-04

Hella Lanka:

Videofilmo en Esperanto pri la Svisa Polico

1997-09-09 MARDO!

José Carlos Cintra:

Esperantistoj en suda Ameriko

1997-09-11

Klubejo fermita pro la klubvespero Marde!

1997-09-18

Thomas Bormann:

Raporto pri Uzbekio (kun lumbildoj)

1997-09-25

Hella Lanka:

Internacia Polica Kongreso en Italio (kun lumbildoj)

[Enhavo](#)

Australio

En Hamburg du formikoj stagxis,

Al Auxstralio ekvojagxis.

En Àltona sur la sxose'
doloris jam la gamboj - ve!

Rezignis ili do en sagxo
pri la resto de l' vojagxo.

(Ne nepre pri la UK en Auxstralio, sed pri malfacilajxoj de vojagxo. Laux *Ringelnatz*.)

[Enhavo](#)

Solvo de la pasinta enigmo

AMEOKAPUCOPRUN
VULTUREMIROANO
ARCOKAREOSAUCO
RMEMORIRIALTOR
EURBLEKIETIOEL
GRPRESADOURINO
ADIAUTRIFRESAV
LAMIRIPAREJOMI
OMONOTONIOOFIC
KARAPACODADOGO
OODORIBATERIO

[Enhavo](#)

Esprimo de L. Zamenhof:
FOR de l' okulo - FOR de la koro!
"AUS DEN AUGEN-AUS DEM SINN!"

ESPERANTO KAJ POLICO.

En la mondo ekzistas ek de la jaro 1955 la INTERNACIA POLICA ASOCIO - IPA -, la plej granda unuigxo de 280.000 gepolicistoj el 59 sxtatoj.

La fondinto estis la Esperantisto kaj angla policisto Arthur TROOP el Lincolnshire, kiu donis al la asocio la konatan emblemon "SERVO PER AMIKECO" (Dienst durch Freundschaft) kune kun la terglobo. Krome ili fondis la UEA-fakan polican grupon kiel fakdelegito. La celo estas, flegi la amikajn rilatojn kaj helpi reciproke al gepolicistoj, plibonigi la rilatojn inter la civitanoj kaj la polico, organizi studvojaĝojn, kongresojn, estimi la toleremon inter la popoloj por pli bona interkomprenigxo kaj sekuri la pacon en la mondo. Nuntempe estas la internacia prezidanto s-ro Armand Jaminet el Luksemburgo, la vicprezidantoj estas el Israel, Zypern, Aŭstrio, la afergvidantoj el Britio, San Marino kaj Svisujo. La monda IPA-kongreso estis cxijare en Quebec, venontjare en Grekujo. La germana prezidanto el Goslar gvidas 55.000 membrojn. La Hamburga IPA-grupo sub gvidado de s-ro Horst Hoeft havas 500 membrojn kaj propran IPA-domon kun hotelcxambroj en Volksdorf. En Germanujo ekzistas 23 IPA-domoj kaj 31 feriaj domoj aux logxejoj. En la UEA-jarlibro restas diversaj fakdelegitoj por polico. Nia iama honora prezidanto August WEIDE kunlaboris tuj en la komenco (1955) kun la Internacia Polica Asocio, starigis Hamburgan polican grupon, instruis pli ol 150 gepolicistojn en Esperanto gxis la ekzamenoj. Kun la subteno de la iama polica prezidanto Bruno Georges, ricevis la ekzamenitaj gepolicistoj 1950 la verdan rubandon kun Esperanto kiel interpretistoj sur la blua polica uniformvesto. Al ili apartenis/as niaj HES-membroj August Weide, Heinrich Wielgus, Horst Schickschneit, Hella Lanka, Hans Wolpers, Flemming, Wortmann, Welf Toissant, Georg Dahl kaj aliaj. Ni oficiale gvidis multegajn skandinaviajn kaj francajn busveturantojn tra Hamburgo, al la polica kazerno, hoteloj, kampadejoj, organizis kunvenojn ecx kongresojn. Polic-superkonsilisto August WEIDE, kies 92-jara datreveno la 8-an de Julio estus okazinta, estis longjara instruisto de la "Cseh"-metodo ne nur en Hamburgo, sed ankaux en Nederlando, Danio, Brazilo ktp, krome li estis longjara prezidanto de H.E.S. Nia konata Henriko WIELGUS ankaux estis prezidanto, sekretario kaj kongresorganizinto, ecx kunfondinto de la Esperanto-domo. Georg DAHL ludis en la teatra grupo "salitaj haringoj". Horst SCHICKSCHNEIT gvidis la popoldancadon en la Hanse-seminario ein Bäk. Hella LANKA laboris kiel instruistino en la polica kazerno ankaux en Esperanto, same en la klubejo, kunorganizis 1974 la Universalan Kongreson en Hamburgo, estas jam ekde 50 jaroj membro de HES kaj dum 8 jaroj HES-kasistino gxis '96. Do vi povas konstati, ke multaj gepolicistoj sukcesplene laboris en la Hamburga Esperanto-movado. Kiu nun riskas diri post tiu.cxi raporto, ke li aux sxi ne volas kontakti kun la polico? ("Mit der Polizei will ich nichts zu tun haben"). En nia Hamburga Esperanto-Societo tiu esprimo maltrafas la meritojn de la Esperanto-policistoj, kiujn ni ne volas forgesi.

Hella Lanka

[Enhavo](#)

Invito al Jubileo

1902 - 95 jaroj Esperanto en Kijlo - 1997

Jubileo 95 jaroj Esperanto ein Kijlo

kaj

Inauxguro
Biblioteko Esperanto-Kijlo



5-a gxis 7-a de Septembro 1997

Vendredo, 5.9.97

19.00 Komuna vespermangxo

20.00 Prelego pri la historio de Esperanto en Kijlo

21.00 Interkona babilado

Sabato, 6.9.97

10.00 Sxipekskurso

19.00 Prelego de *José Carlos A. Cintra* pri Utilo de Eperanto

20.00 Geedzigmangxo de *Sabine* kaj *Christian*

Loko: Alte Räucherei, Julienstraße 11, 24148 Kiel, Tel: 72 11 13

Kostoj: Programo 70 DM, 2 tranoktoj ek de 70 DM,

mendu cxe Sabine Meyer aux Christian Darbellay, Johannesstraße 54, 24143 Kiel, Tel (0431)

73 77 88, resp. el eksterlando +49 431/73 77 88.

[Enhavo](#)

Malmö invitas al Kulturaj kaj turismaj tagoj

Suda distrikto de Sveda Esperanto-Federacio
invitas al

Kulturaj kaj turismaj tagoj en Malmö
12 - 14 septembro 1997.

Kostoj:

(2 noktoj kun matenmangxo)

en trilita cxambro SEK 220,--

en dulita cxambro SEK 300,--

en unulita cxambro SEK 540,--

Aligxu cxe: Gertrud Lund

Falkmansgatan 7 B

SE-21762 Malmö

[Enhavo](#)

Landa Kunveno 1997

Meklenburgio-Antauxpomerio

6a de Septembro en Schwerin

Temo: Pripensado pri ni

Tempo: 9.30 h gxis 17.00 h

Loko: Domo de la Kulturligo

Mecklenburgstraße 2, proksime de la lago Pfaffenteich.

Temo: Kion ni iam faris pli bone, kion ni ne faris, kvankam estus grave, kiel prezentigxi al lapubliko, kion fari por ne maltrafi la trajnon al unuigxinta Euxropo.

Flanka programo: Urborigardo

[Enhavo](#)

Stranga benzinejo: la solvo

En la pasinta (antauxpasinta, FM) eldono de Esperanto Hamburg mi raportis pri benzinejo, kie oni ne plu vendis benzinon. Intertempe montrigxis la kauxzo:

Kiam apude estis finkonstruita nova granda benzinejo, la skipo de la benzinejo transiris tien kaj nun laboras tie. Do, la solvo estas tute simpla: Ili nur atendis en la malnova loko gxis la pretigxo de la nova.

BK

[Enhavo](#)

Ni gratulas al Sabine Meyer kaj Christian Darbellay

okaze de ilia geedzigxo.

Bedauxrinde la dato ne estas konata (9.7.97, FM), de tiu speciala tago, kiam ili trovis - inter la loka laboro, starigo de biblioteko, organizado de jubilea kunveno kaj vojaĝxo al kongreso - duonhoron libera por geedzigxi.

La Estraro kaj membroj de Hamburga Esperanto-Societo

[Enhavo](#)

Kolzo-Metil-Estero

estas la teknika termino por tiu dizel oleo, kiu estas farita el kolzo, en Germanio tre konata kaj tradicie kulturata planto.

Antaux unu jaro nur ekzistis unu benzinejo en Hamburg, kiu vendis *Bio-Diesel*, nun estas jam ses.

Eblas uzi gxin en dizelmotoroj sen teknikaj sxangxoj.

BK

[Enhavo](#)

[Re al la cxefpagxo](#)